

# *La Riverego* kebekia esperantista bulteno

Decembro 2004

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 19, No 78

## Mia tria Okemo

**Martin Benoît**

Jen mia tria Okemo! Ups, ARE! Ekoktobre mi ĉiam entuziasmiĝas atendente la tritagan semajnfino. Vendrede vespere, post mia nova laboro, mi preparis miajn pakaĵojn, pripensante kion mi forgesos ĉi-foje! Sabate matene, jen vekigo je la sesa kaj duono. Mi matenmanĝis, min duŝis, kaj mia kunloĝanto veturigis min ĝis la domo de Normando. Jam alvenis Arono, Karolina kaj Argilo el Otavo, Paŭlo el Montrealo, kaj Jofilipo el Sankta-Bruno, kaj kompreneble, Normando kaj Zdravka! Kaj jen survoĵante Okemen!

Mi amuziĝis multe en Okemo. Ni ludis ekstere svedan ludon nomatan Kubo. La ludo celas, ĵetante bastonojn, trafi la malamikajn lignajn kubojn ĝis ili ĉiuj falu. La reguloj fakte pli kompleksas! Poste, ni ludis en la apartamento la rolludon «Mafio». La ludo situas en vilaĝo en kiu okazas misteraj murdoj. Ĉiu ludanto havas rolon, ĉu civitano, ĉu mafiano, ĉu anĝelo, kaj strebas, eĉ per mensogo, plenumi sian celon. Do, dum parolado, oni akuzas unu la alian, kaj pli kaj pli, malpli da ludantoj ludas, ĝis unu teamo gajnas (bono aŭ malbono!) Estas vere amuza ludo, kvankam mi ne bone mensogas! Ni ankaŭ ludis Krokinjolon, kaj eĉ naĝis, ĉar tie estas naĝejo!

Tamen, ne estis loko por nur amuziĝi. Temis ankaŭ pri problemoj kaj solvoj de la movado. Chuck Smith arigis nin en kelkaj grupoj por diskuti kaj

cerbumadi pri la ĉefaj problemoj de la nordamerika movado, kaj poste pri solvoj al tiuj problemoj. Mi pensas ke tio estis tre taŭga, ĉar tiu ekzerco estis konstruiva por trovi kion ni povas fari, praktike fari por pliboniĝi la movadon. Ankaŭ, Normando prezentis al la partoprenantaro proponojn por translokigi Okemon al pli taŭga loko, kaj novajn nomojn por la nova nomo de Okemo. Do la partoprenantoj voĉdonis iri al Silver Bay, belega apudlagomonta konstruaĵaro, kaj pri la nomo «ARE» (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto). Tio ankaŭ temis pri grava diskuto, kaj tio alportos nin al ekscita nekonateco venontjare!

*Eĉ post tri jaroj da esperantumado, mi ĉiam miras ke mi ankoraŭ miras pri Esperanto!*

Eĉ post tri jaroj da esperantumado, mi ĉiam miras ke mi ankoraŭ miras pri Esperanto! En la kultura vespero, mi amuziĝis kiam Ĝona, infaneto, kaj liaj gepatroj, kantis infanecan kanton. Eĉ infanoj lernas Esperanton! Ni povas

konscii ke ili povas lerni Esperanton, sed kiam oni aŭdas el iliaj buŝoj esperantajn vortojn, nur tiam ni povas scii ke nia lingvo universalas. Maria ankaŭ mirigis min per sia tiel lerta rakontado kaj kantado. Mirigas min ankaŭ la rapideco laŭ kiu iuj povas lerni la lingvon. Jofilipo, Esperantisto ekde nur tri monatoj, tre bone sukcesis elturniĝi per la lingvo dum la semajnfino. Esperanto sukcesis interkomprenigi ĉiujn per sama lingvo, ĉu franclingvano, ĉu anglalingvano, ĉu kanadano, ĉu usonano, ĉu alilingvanoj kaj alinacianoj, ni ĉiuj sentis sin kiel samkomunumanoj.

## Faldfolioj?

La Société québécoise d'espéranto a fait imprimer au cours du mois d'octobre un nouveau dépliant promotionnel. Même s'il reprend sensiblement le même texte que l'édition précédente, ce dépliant a une toute nouvelle esthétique plus dynamique. Jugez-en par vous même! Nous en avons joint un avec La Riverego.

Ce n'est pas tout d'avoir un nouvel outil de promotion, il faut s'en servir! Trop peu de gens savent ce qu'est l'espéranto au Québec. C'est à votre tour d'agir : donnez ce dépliant à vos amis ou laissez-le traîner dans votre salle de pause au travail. Si vous vous sentez en forme pour faire la promotion de cette langue faites-nous signe : nous pouvons vous en faire parvenir d'autres. De plus, nous avons des affiches si vous souhaitez organiser un kiosque ou rendre votre présence encore plus visible.

## Propono el Saskaĉevano

Membro el Saskaĉevano, S-ro Bruce Arthur, proponis al ni, ke la estraro ne plu okupiĝu pri la aranĝo de la ĉiumonata Montrealaj Kunvenoj. Li proponas ekzemplon de asocio, en kiu la jara ĝenerala kunsido komisiis diversajn membrojn zorgi pri la monataj vesperoj, laŭ listo de temoj.

# Interalie

**Sylvain Auclair**

## **Eblaj ŝanĝoj pri Le Monde de l'Espéranto**

Vi eble scias, ke tiun belan revuon la Societo ofertas laŭ aparta metodo: ni mendas ĝin grupe, pakaĵo venas kaj ni mem, en Montrealo, enkovertigas ĝin kaj aldonas nian La Riveregon, se eldonata en tiu monato. Ni nun kun la Unuiĝo franca por Esperanto negocas novan metodon, laŭ kiu UFE mem sendus al la Kebekiaj abonantoj, laŭ listo sendita de ni. Kontraŭ ĉia espero, tiu metodo estus malpli kosta, kio ebligus malaltigi la abonkontizon al pli akceptebla nivelo. Se ĉio glatas, jam en januaro vi rekte ricevus la revuon. Estu certa, ke via abono estas en ordo: ni devos frue sendi la adresojn.

## **Changements à propos du Monde de l'Espéranto**

Vous savez sans doute que la Société offre cette revue selon une entente spéciale: nous faisons venir un paquet d'exemplaires que nous expédions

nous-mêmes de Montréal en y ajoutant, le cas échéant, un exemplaire de La Riverego. Or nous sommes en ce moment à discuter avec l'Union française pour l'espéranto une nouvelle entente, selon laquelle c'est UFE qui ferait elle-même l'envoi grâce à une liste d'adresses que nous leur ferions régulièrement parvenir. Contre toute attente, ce système se révélerait moins coûteux, ce qui nous permettrait de remettre le prix de l'abonnement à un niveau plus acceptable. Si tout va bien, vous recevriez la première revue «directe» dès le mois de janvier. Assurez-vous bien de renouveler votre abonnement au plus vite, si nécessaire, puisque nous devons envoyer la liste d'adresses en avance.

## **Nova kotizo**

La estraro ĵus decidis simpligi la kotizistemon de ESK. Ekde nun, ekzistas baza dujara kotizo je 25 \$, plus dumviva kotizo, senŝanĝa je 300 \$.

Cetere, tiujn membrojn, kiuj ne repagis sian kotizon ni konservas en nia adreslisto, tiel ke ni povos per Interreto in-

formi ilin pri gravaj okazaĵoj, inviti ilin al eventoj, k.s.

## **Nouvelle cotisation**

Le Conseil vient de décider de simplifier le système des cotisations à la SQE. Dorénavant, il n'existera plus qu'une adhésion pour deux ans fixée à 25 \$, en plus de l'adhésion à vie, toujours à 300 \$.

De plus, les membres qui n'ont pas renouveler leur cotisation resteront sur notre liste d'envoi courriel, de manière à ce qu'ils soient informés des activités ou des événements importants.

## **UEA 2005**

Eniru la tutmondan movadon pere de la Universala Esperanto-Asocio.

Vizitu la retejon :  
[www.uea.org/alighoj/index.html](http://www.uea.org/alighoj/index.html)



## **Société québécoise d'espéranto Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en janvier, mai, septembre et novembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédacteur en chef Jessy Lapointe ([jessy@esperanto.qc.ca](mailto:jessy@esperanto.qc.ca)). Cette édition a été mise en page par Jérôme Frédéric Bouchard. Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Jérôme Frédéric Bouchard (vice-président), Sylvain Auclair (trésorier) et Martin Benoît (conseiller).

*La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : januare, majo, septembro kaj novembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Ĉefredaktoris Jessy Lapointe ([jessy@esperanto.qc.ca](mailto:jessy@esperanto.qc.ca)). Paĝaranĝo por tiu-ĉi eldono farita per Jérôme Frédéric Bouchard. Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Jérôme Frédéric Bouchard (viceprezidanto), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Martin Benoît (konsilanto).*

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2005.01.15

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal (Québec) • H2G 2R8 • [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca) • [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

# Pourquoi apprendre l'espéranto?

## Normand Fleury

Durant la dernière fin de semaine espérantophone à Okemo au Vermont en octobre dernier, j'ai demandé aux 48 participants (17 du Canada et 31 des É.U.) de répondre à la question suivante: pourquoi avez-vous appris l'espéranto? Voici l'ensemble des réponses. Le chiffre indique combien de répondants avaient la même réponse, exemple: «à cause de son mari» (3)

### Pourquoi avez-vous appris l'espéranto?

Je m'intéresse aux langues (2)  
Mes parents m'ont offert d'aller en voyage au congrès mondial d'espéranto.  
Raisons politiques  
Pourquoi pas!  
Pour un monde meilleur  
Je voulais créer une telle langue  
J'ai entendu des espérantophones parler dans cette langue  
Je suis un marginal (2)  
À cause de mon mari (3)  
À cause de mon professeur (2)  
Pour rien au début, pour le mouvement par la suite  
Pour apprendre une nouvelle langue (2)  
J'ai pensé que c'était une idée bizarre et je voulais voir si la langue fonctionne  
Je veux être citoyen du monde  
Parce que c'est une langue originale  
À cause de mes fils  
Je suis idéaliste  
Je n'ai pas réussi à apprendre le français (2)  
J'ai étudié la linguistique et entendu parler de l'espéranto (2)  
Pour voyager (2)  
Solution rationnelle au problème de communication (2)  
J'ai entendu parler de la facilité et la logique de la langue (2)  
Pour utiliser le Pasporta Servo (2)  
J'aime l'idée d'une langue internationale neutre (2)  
L'espéranto est venu à moi  
Pour découvrir de nouvelles cultures

En étudiant la littérature, j'ai entendu parler de l'espéranto

Je suis d'accord avec la philosophie interne de mouvement

À cause de George W. Bush (n.d.l.r. en réaction contre)

J'aimais l'idée d'une langue simple et logique

Pour me prouver que je pouvais apprendre cette langue

J'étais attiré par la structure d'une langue planifiée

J'espère que vous vous êtes reconnu dans ces affirmations!

## Legu la adresojn

Se vi rigardas sur la adresetikedo, apud via nomo, vi povos legi, inter rektaj krampoj, la momenton kiam finiĝas via membreco kaj la lastan numeron de via abono al Le Monde de l'Espéranto. Antaŭvidu kiam vi pagu la kotizojn.

### Allez voir votre adresse

Si vous regardez sur l'enveloppe de ce bulletin, vous pourrez lire, à côté de votre nom, entre crochets, le mois d'échéance de votre adhésion à la Société et, si vous y êtes abonné, le numéro du dernier Monde de l'Espéranto de votre abonnement. Ne soyez plus surpris par nos lettres de réabonnement.

# Kial lerni Esperanton?

## Normand Fleury

Dum la lasta Internacia Semajnfino de Esperanto en Okemo, Vermonto, mi starigis demandon al la 48 partoprenantoj (17 el Kanado kaj 31 el Usono) kial ili lernis Esperanton. Jen la rezulto. La ciferoj indikas kiom da personoj respondis samopinie, ekzemple: pro la edzo (3) signifas ke 3 personoj respondis tion.

### Kial mi lernis esperanton?

Pro intereso pri lingvoj (2)  
Miaj gepatroj ofertis pagi al mi vojaĝon al Universala Kongreso de E.  
Politika kialo  
Kial ne!  
Por pli bona mondo  
Pensis krei lingvon  
Aŭdis Esperantistojn paroli inter si  
Mi estas strangulo (2)  
Pro la edzo (3)  
Pro instruisto (2)  
Senkiale komence, poste pro la movado  
Lerni plian lingvon (2)  
Mi pensis ke estas stranga ideo kaj vo-

lis vidi ĉu funkcias

Mi volas esti mondĉivitano

Kiel junulo pro la strangeco de la lingvo

Pro la filoj

Mi estas idealisto

Mi malsukcesis lerni la francan (2)

Mi studis lingvistikon kaj aŭdis pri E. (2)

Por vojaĝi (2)

Racia solvo al la problemoj de komunikado (2)

Mi aŭdis pri ĝia facileco kaj logiko (2)

Uzi Pasportan Servon (2)

Mi ŝatis la ideon de internacia neŭtrala lingvo (2)

E. venis al mi

Por koni novajn kulturojn

Studante literaturon aŭdis pri E

Konsentas kun la interna ideo

Pro Bush

Ŝatis la ideon de simpla logika lingvo

Pruvi al mi mem ke mi povas lerni tiun lingvon

Scivolemo pri la strukturo de artefarita lingvo

Mi esperas ke vi iel rekonis vin inter tiuj diraĵoj!

# Malaperantaj vortoj

Bruce Arthur

Saluton

Kwai kwai

Wa-é ák-wé

Oki

Kwei

Wáciye

Tân'si

Yowtz

Klahowya

Kii-te-daas a

Tu ough qua no u

Duono el la lingvoj parolataj sur la Tero povus malaperi antaŭ la mezo de ĉi tiu jarcento, laŭ avertoj de lingvistoj. Kaj multaj en Kanado estas sur la listo de nesekuraj lingvoj.

Indiĝenaj nacioj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando ĝis Tajvano sentis la urĝan bezonon konservi lingvon, kaj oni en ĉi tiu lando nun urĝe klopodas konservi dekojn da lingvoj.

**«Iu povus diri,  
ke vi ne plu estas  
nacio ĉar vi ne  
havas lingvon»**

«Iu povus diri, ke vi ne plu estas nacio ĉar vi ne havas lingvon», diras penseme Amos Key la plijuna, kiu estas la direktisto de la Fako pri Lingvoj de Unuaj Nacioj ĉe Arbara Kultura Centro proksime al Brantford, en Ontario. «Mi ne volas aŭdi tion dum mi ankoraŭ vivas.»

Nur 24 el cent el homoj nomitaj indiĝenoj en Kanado povas paroli per sia indiĝena lingvo, laŭ la loĝantaronombro de 2001. Tri indiĝenaj lingvoj — kri, oĝibŭe kaj eskima (Inuktitut) — estas lingvo de granda plimulto el tiuj parolantoj. Multaj aliaj indiĝenaj lingvoj estas sciataj fare de nur kelkaj maljunuloj nuntempe.

E la 60-70 historiaj indiĝenaj lingvoj en Kanado, proksimume dek jam perdiĝis, dek du estas laŭdire malaperontaj tre baldaŭ kaj sama nombro estas nesekuraj.

Key, kiu estas membro de la Ses Na-

cioj de la Grand-Rivera Teritorio, en sud-okcidenta Ontario, diras ke kiam li estis lerneĵano, «estis malpermesite instrui indiĝenan lingvon.»

Le sciencistoj avertis, ke ĉi tiaj pasinttempaj kampanjoj asimili, kune kun malpliĝintaj nombroj da indiĝenoj, pliĝanta translokiĝemo, ekonomiaj premoj, kaj la sperto de televido kaj aliaj komunikaj teknikoj, ke ĉiuj ĉi aferoj povus malaperigi duonon el la 6000-7000 lingvoj de la mondo ĝis 2050. Ili avertas ke kune kun tiu malpliĝo, malperos ankaŭ lokaj scioj, pens-manieroj, kreemo kaj tradicioj, kaj ankaŭ fakaj informoj, kiel unikaj kapabloj kaj tradiciaj medikamentoj.

En 2002, la Kanada registaro promesis disponigi 160 milionojn da dolaroj dum dek-jara periodo, por konservi indiĝenajn lingvojn kaj kulturojn. Indiĝenaj estroj kredas, ke tiu ago estas plejgrava.

«Kanado devas konscii ke ĉi tiu perdo efikas ne nur nin. Estos perdo al Kanado ankaŭ» diras Ron Ignace, la estro de la Laborgrupo pri Indiĝenaj Lingvoj kaj Kulturoj, kiu donas politikajn rekomendojn al la federacia ministerio pri Heredaĵo.

Ignace, kiu estis la ĉefo de la Unua Nacio Skeetchestn, proksima al Kamloops, en Brita Kolumbio ĝis la pasinta jaro, rimarkigas ke oni en aliaj landoj rigardos la helpon de Kanado al indiĝenaj lingvoj. Lia edzino, Marianne Boelscher-Ignace, kiu estas profesoro pri antropologio kaj pri studoj pri unuaj nacioj ĉe la Universitato Simon-Fraser, ankaŭ partoprenas tiun tutmondan interparoladon.

«La sorto de indiĝenaj lingvoj fariĝis multlanda afero», ŝi diras. Ekzemple, ŝi diras ke la maoria lingvo iĝis oficiala lingvo en Nov-Zelando antaŭ proksimume 20 jaroj pro movado de maoriaj homoj kiuj rimarkis, ke iliaj infanoj ne plu uzis la lingvon.

Parto de la Nov-Zelanda metodo estats krei «lingvajn nestojn» kiuj instruas la maorian lingvon al tre junaj infanoj en infanvartejoj.

La plej gravaj indiĝenaj organizoj en Kanado — la Asembleo de Unuaj Nacioj, la Mestiza Nacia Konsilio kaj la Inuit Tapiriit Kanatami — disvolvigis similan servojn en lernejoj, sed estas defioj. Unu estas la diverseco de indiĝenaj lingvoj. Alia estas ke maljunuloj parolas la lingvon kaj kapablas instrui ĝin al la junuloj, sed la gepatroj de la meza generacio ofte ne scipovas la lingvon. Pro tio, estas grava truo kiun malpliigas la uzeblon de la lingvo. Ankaŭ estas multe da geedziĝoj inter indiĝenoj kaj neindiĝenoj, kaj tio malsimpligas la klopodon.

Nombro da konservaj klopodoj aperas. Ekzemple, Tom Hukari, kiu estas fakulo pri la lingvo Salish ĉe la Universitato de Viktorio, estas la provizora direktisto de kvin-jara projekto kiu ricevis monon de la Konsilio de Esplorado de Sociaj Sciencoj kaj Hom-Studoj kaj kiu celas revivigi lingvojn en grupoj de unuaj nacioj laŭ la marbordo de Brita Kolumbio.

«Ni celas trovi medion, kie lingvolernado estos sukcesa», diras Hukari, kies servo inkluzivas tion, ke oni instruas al junaj indiĝenaj homoj registiri videokasede maljunulojn por registri ilian lingvon.

Mary Jane Norris, la direktisto de esplorado ĉe la Fako pri Indiĝenaj Aferoj en la Ministerio de Kanada Heredaĵo, diras, ke multaj aferoj efikas tion, kiel lingvo transdoniĝas al infanetoj. «Estas la komunumo, estas klerigado, kaj estas la familio. Oni ne povas fari ĝin sola.»

Politikoj kaj leĝoj povus helpi konservi indiĝenajn lingvojn. Tion diras Pamela Shaw, la direktisto de la Fakero de Interrilatado de la Fako pri Indiĝenaj Aferoj en la Ministerio de Kanada Heredaĵo. Ŝi diras, ke leĝoj por

## ...Malaperantaj vortoj (sekvo)

konservo aŭ agnosko povus pliigi registaran helpon al servoj pri indiĝenaj lingvoj, kaj ankaŭ pligravigi indiĝenajn lingvojn en indiĝenaj komunumoj.

«Ne temas nur pri la perdo de lingvo, ŝi diras. Temas ankaŭ pri kapablo transdoni kredsistemon, varti la novan generacion, konservi kulturon.»

*Ĉi tiu artikolo estas traduko fare de Bruce Arthur de artikolo «Vanishing Words», aperinta en numero aŭtuno 2004 de Canada World View, kiun eldonas la Ministerio pri Fremdaj Aferoj.*

### Okemo ne plu, vivu ARE!

Nu, estis iom da malgajo en la aero por pluraj partoprenantoj de la 11-a Internacia Semajnfino de Esperanto, ne nur ĉar ni decidis ne plu kunveni en Skiejo Okemo, Ludlow, Vermonto, sed ankaŭ ĉar la nomo Okemo malaperos post 11 jaroj da esperantista uzado. En 2005, la oktobra kunveno por la esperantistoj el Kebekio, Ontario, NovAnglio kaj NovJorkio nomiĝos la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto, mallonge ARE. Temos tamen pri la 12-a ARE (kaj ne pri la 1-a ARE).

La lasta Okemo-kunveno en Vermonto estis sukcesa kun partopreno de 17 personoj el Kanado kaj 31 el Usono.

Se vi volas partopreni en la reta diskutgrupo pri ARE aliĝu al : <http://groups.yahoo.com/group/auxt-unarenkontigxo>

Normand Fleury

## Vola Püg'!

**Henri De Sabates,  
ĉefredaktoro de Vola Püg'**

Vi certe jam aŭdis pri la reta humurgazeto Vola Püg'. Se vi ankoraŭ ne konas ĝin, iru al: [www.volapug.net](http://www.volapug.net)

Multaj homoj maltrankviliĝas kaj skribas al ni: ĉu Vola Püg' mortas? Kiam estos nova numero? Ne timu: la numero 4-a baldaŭ aperos dum la sekvaj monatoj.

Sed estas alia novaĵo: ni ankaŭ faros paperan version de Vola Püg'. Jes, papere vi povos rekte tuŝi ĝin!

Cetere, kvankam ni estas jam aro da geredaktantoj, ne multaj bildstrioj alvenas al nia redakcio. Kaj ni vidas tie kaj tie Esperantistojn, kiuj desegnas.

Sed ofte ili ne aŭdacas kontakti VolaPug-on por proponi siajn desegnojn ĉar ili pensas: tio ne estas mia stilo de komiksoj, tio ne estas mia stilo de humuro, ktp. Sed nepre ne pensu tiel: Vola Püg' estas malfermata al ĉiaj specoj da humuro kaj desegnoj! Se kelkaj personoj opinias, ke la gazeto aspektas tro eŭropeca, estas ĉar estas multaj (tro da) eŭropaj redaktantoj en la teamo, sed ni volas vere internaciigi la gazeton: do, esperantistaj desegnistoj el ĉiuj kontinentoj, ni bezonas vin!

Por kontakti nin, unu adreso: [redaktejo@volapug.net](mailto:redaktejo@volapug.net).

## MusicExpress

**Flávio Fonseca**

La brazila sukcesa retejo MusicExpress estas nun en Esperanto! Vidu mem al: [www.musicexpress.com.br/eo](http://www.musicexpress.com.br/eo) kaj ekonu ĝin!

Ĝi ricevas pli ol 300 000 vizitojn ĉiumonate, kaj estas konata en Brazilo kiel gastigejo de bonkvalitaj artistoj.

En MusicExpress vi trovos informojn pri artistoj de la tuta mondo, en pluraj stiloj kaj lingvoj (dekoj da Esperantaj), MP3-dosierojn, muziktekstojn kun akordonomoj, komputilajn programojn, kaj ĉiusemajne aktualajn novaĵojn pri muziko, pri tio kion faras niaj artis-

toj, kaj pri ĝeneralaj muzikaj temoj.

Novaj muzikaĵoj, novaj altkvalitaj artistoj kaj novaj akordaĵoj diversstilaj estas aldonataj konstante. Kaj aliaj frandaĵoj estas preparataj, garantiantes, ke MusicExpress estos tiel bona en Esperanto kiel ĝi jam delonge estas en la portugala.

MusicExpress en Esperanto ne estas retejo pri Esperanta muziko. Ĝi estas la unua retejo en Esperanto pri muziko! Pro tio, krom havi riĉan kolekton da materialo je via dispono, ĝi donacas al vi efikan propagandilon de la Internacia Lingvo.

# Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
2004-dec-18-sab.	Botanika Ĝardeno †	18h	Decembra festo kaj komuna bufedo en salono.
2005-jan-11-lun.	Commensal *	18h	Babila vespero
2005-jan-28-ven.	MEDO **	20h	Klonado, OGM (debato k diskuto)
2005-feb-14-lun.	Commensal *	18h	Babila vespero
2005-feb-25-ven.	MEDO **	20h	Religio (kion vi pensas pri ĝi?)
2005-mar-14-lun.	Commensal *	18h	Babila vespero
2005-mar-25-ven.	MEDO **	20h	Muziko
2005-apr-9-sab.	MEDO **	19:30h	Filma vespero
2005-apr-11-lun.	Commensal *	18h	Babila vespero
2005-apr-29-ven.	MEDO **	20h	Literaturo (mia plej ŝatata libro)
2005-maj-9-lun.	Commensal *	18h	Babila vespero
2005-maj-21-22-23	Toronto		MezKanada Renkontiĝo (MEKARO)
2005-maj-27-ven.	MEDO **	20h	Mia profesio, okupo...
2005-jun-13-lun.	Commensal *	18 h	Babila vespero
2005-jun-17-ven.	MEDO **	20h	Komputiloj, linukso, skajpo... (Lasta vendredo estas 24 <sup>a</sup> de junio!)
2005-sep-12-lun.	Commensal *	18h	Babila vespero
2005-sep-30-ven.	MEDO **	20h	Temo decidota
2005-okt-8-9-10	NovJorkio, Usono	12a	Aŭtuna Renkontiĝo (ARE)
2005-okt-28-ven.	MEDO **	20h	Temo decidota
2005-nov-12-sab.	MEDO **	19 h 30	Filma vespero
2005-nov-25-ven.	MEDO **	20h	Temo decidota
2005-dec-17-sab.	Botanika Ĝardeno †	18h	Decembra festo kaj komuna bufedo

\* **Commensal** : 1720, rue Saint-Denis, 845-2627, métro Berri-UQAM

18h *Libervola alveno por manĝo.*

Souper libre

19h *Amika babilado sen fiksita temo.*

Discussion amicale sans thématique

\*\* **Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**: 6358-A rue de Bordeaux (entre Papineau et De Lorimier), Montréal

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro pruntado aŭ aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

† **Botanika Ĝardeno (Jardin Botanique)** : 4101, rue Sherbrooke Est, Montréal

Métro Pie-IX, stationnement gratuit

ENTREZ PAR LES SERRES, derrière le bâtiment administratif.

Por komentoj, proponoj, demandoj : [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)